



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 9/10
1963

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
29-a (37-a) jaro
Monata

La Homaj Rajtoj

Ankaŭ en la runa epoko, la epoko de la plej vasta kulturo kiu iam ekzistis, ni tro ofte spertas, ke homoj ne respektas la homajn rajtojn de aliaj homoj. Estas efektive strange, ke ne ĉiu homo povas senpere kompreni kaj konsenti, ke ankaŭ ĉiuj aliaj homoj estas homoj, kaj pro tio — nur pro tio — havas kaj devas havi la samajn rajtojn. Kiu eltrovis, ekzemple, la ideon, ke unu raso de la homoj estu malpli valora ol alia? Ĉu ne ankaŭ inter hundoj ekzistas diversaj rasoj — sen diskriminacio?

Ĉar evidente tio ne estas memkomprenebla, oni akceptis en Parizo antaŭ 15 jaroj, la 10-an de decembro 1948, la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj. En ties du unuaj artikoloj troviĝas la fundamentoj de ĉiu kunekzistado: libereco, egaleco, frateco, malpermeso de diskriminacio. La ekzisto de ĉia malharmonio ne senvalorigas la Deklaracion, kiel opinias kelkaj homoj, sed ja male necesigas ĝin.

Precipe ni esperantistoj havas kaŭzon por pripense soleni la 15-jaran

datrevenon de la Deklaracio. En la statuto de UEA troviĝas la deklaro, «ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo.» Ni estas, efektive, per nia propra programo ligitaj al respekto de la Deklaracio. Ordinare niaj kluboj en decembro honoras D-ron Zamenhof per ia memoriga programo. Kio estus pli facila kaj pli konvena ol samtempe memorigi pri la Deklaracio de la Homaj Rajtoj? D-ron Zamenhof oni ne povus pli dece honorati. Ĉiu esperantisto ja konas la suferojn de la juna bjalistoka knabo, kiu vidis surstrate en sia hejmurbo la kruelan veron, kiu ŝajnis kontraŭi al la instruo de lia patrino, ke ĉiuj homoj estas fratoj.

Kunlige kun tia programo, ĉiu klubo devus sendi saluton per telegramo aŭ letero al Unuiĝintaj Nacioj, New York aŭ/kaj al UNESCO, Place de Fontenoy, Paris VII. Ni scias ĉiuj, ke UEA havas konsultan kontrakton kun UNESCO, kiun ni povus en deca maniero gratuli je ĉi tiu okazo.

Vidu ankaŭ p. 116.

JHR

POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

Borobuduro.

El Hindujo ili venis kaj el Hinduĉinujo, kun siaj diversaj religioj. Templojn ili konstruis kaj sanktejojn por la gloro de Budho kaj la hinduaj dioj. Dum jarmiloj ili vivis en paco kaj kontenteco. En la 15-a jarcento alvenis la mahometanaj misiistoj. Rapide islamiĝis la popolo, kaj anstataŭ hinduaj princoj ekregis sultanoj. Kun fajra fervoro la novaj misiistoj detruis la diojn hinduajn kaj preĝejojn budhistajn.

Ektimis la budhistaj preĝistoj por la templo de Borobuduro aŭ templo de multaj budhoj. «Ĉu permesi la detruon de la plej bela sanktejo?» Nepre neniam! Laŭlegende ili ĝin kovris per tero; kaj kaŝita ĝi restis dum la jarcentoj, ĝis kiam ĝi estis retrovita antaŭ kelkaj jardekoj.

La templo de Borobuduro estis konstruita en la 9-a jarcento. Ĝi aspektas kiel kolosa krono sur la pinto de eta monteto. Kvadrata kiel la piramidoj, sed superŝutita per centmiloj da figuroj, skulptitaj sur la muroj de la senfinaj terasoj. Sur la kvar subaj, kvadrataj terasoj leviĝas tri rondaj, ornamitaj per 72 sonorilformaj turettoj. En ĉiu tureto sidas budho-statuo kaj en la centro leviĝas la ĉefa pagodforma turego. Sur la muroj de la diversaj terasoj vidiĝas pli ol 400 niĉoj kun pliaj naturgrandaj budho-statuoj. Kaj se oni kunmetus la 1504 bareliefajn desegnaĵojn, oni havus historion, kiu mezurus 5 kilometrojn. Kompleta «Bildo-Biblió», kiu interese raportas pri la religia, agrikultura kaj komerca vivo de antaŭa jarmilo. La templo estas konstruita el vulkana ŝtono kaj mezuras 160 metrojn ĉe la bazo. Laŭlegende ĝi staras sur parteto de la

cindro de Budho. Hodiaŭ la templo estas arkeologia juvelo. Ĉar tro multajn kapojn kaj brakojn forŝtelis la turistoj, la templon nun gardas mahometanaj javanoj. Vera paradokso! Ĉar la islama religio ne toleras bildojn de dioj.

Vortklarigo:

Mahometo — Muhammed
misiisto — misjonær
fervoro — iver
preĝisto — bønnemann
ĝi estis retrovita — ble gjenfunnet
estis konstruita — ble bygget (perf. part. brukes her om en enkeltstående meddelelse i fortid)
aspekti — se ut, ha utscende som
superŝutita — overdryset
suba — undre, som er under
leviĝas tri rondaj (terasoj)
tureto — småtårn
turego — kjempeårn
vidiĝas — sees
pliaj — fler, en flerhet av
kunmetus, havus, mezurus — (kondisjonalis) hvis man satte sammen konstruita el — bygd av
Ĉar multajn kapojn forŝtelis (obj.) . .
Da mange hoder er blitt stjålet av turistene, blir nå templet voktet av . . .

Korespondu!

Edward F. Lacy III (34-jara) dez. interkor. svatiĝe kun bela, beltalia junulino de Norvegujo, kiu scias sperte la internacian lingvon. Enhavu bildon. Adreso: 6923 Schley Street; Houston, Texas 77017; Usono.

S-ro G. Selhorst, Burg Peecklaan 8, Schoorl, Nederlando, 18-jara, deziras kor. kun gejunuloj. Intereso: etnologio, geografio, belaj bildoj.

S-ro Emilio Folgado López, Str. Cardenal Cisneros 48, Bajadoz, Hispanujo, 35-jara oficisto, dez. kor.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

Antaŭ nova jaro

Ĉe la sojlo de nova jaro — post jaro kun plia progresado de nia movado kaj kun sukcesplena granda kongreso — ĉies elkora deziro estas, ke ni, kun la sindona helpo de nepre ĉiu esperantisto kaj ĉiu klubo faros gravegan paŝon antaŭen. Ke tio estu en niaj pensoj — sed ke ĝi ne restu nur pensoj!

Per ĉi tiuj vortoj ni dankas pro intereso, leteroj, sugestoj, kontribuoj kaj kritikoj en la nuna jaro, esperante, ke ni povos en la nova jaro ĝui la saman intereson ĉe niaj legantoj.

Ni ankaŭ deziras al ĉiu el vi ĝojan kristnaskon!

El nia poŝto

«NE» al mi tre plaĉas kaj mi estas tre kontenta kaj dankema al s-ro Per Engeset por abono al tiu ĉi revuo!

Mi deziras al «NE» kaj al ĉiuj norvegaj esperantistoj bonan kaj fruktdonan movadon kaj atingi venkon en nia granda ideo! Mi volas, ke «NE» vizitus ĉe mi sen interrompo!

Kun Amikaj Salutoj!

Venislovas Baltrus
Joniŝkelis, Litovujo, USSR

Sciigoj de N.E.L.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al NEL. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Kursoj. Jam estas tempo plani la kursojn dum la printempa sezono. Klubo, kiuj ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. Sen kursoj neniuj progresoj. Kaj ĉiuj kluboj devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbas kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,— kiam li sendas la mendon. Prez-oj: Parto I: kr. 23,—; parto II: kr. 25,—; ambaŭ partoj kune: kr. 42,—. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prez-oj estas: kr. 17,—, kr. 19,—, kr. 32,—.

Taskotabelo por la kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi kotizon por la venonta jaro kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de UEA daŭrigas la kolektadon de UEA-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkularporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kaslibrojn por revizio.

Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun la skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al NEL kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (Bl. A 10/E 1) al NEL kaj al la Distrikto. La Komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al NEL kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

LA KONTORFONDAĴO

Kiam NEL ekhavis sian malgrandan, sed tre utilan kontoron, oni starigis «kontorfondaĵon», al kiu la membroj afable donacis diversajn sumojn, kaj kiu ebligis al ni teni la kontoron dum preskaŭ 25 jaroj.

Jam delonge la kontoro estas tro malgranda, kaj ni serioze klopodas por akiri pli grandan. Estas malfacile kaj kosta monon, sed se ni efike laboru, ni bezonas pli vastan lokon.

Sed lastatempe la membroj evidente forĝis la kontorfondaĵon, ĉar ni ricevas tre malmultajn donacojn por ĝi. Mi tial permesas al memorigi al vi, ke se vi havas okazon, viaj donacoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, estas treege konvenaj. La kontorfondaĵo ebligis la laboron de NEL dum jar-

dekoj. Ni esperas ke nun ĝi ebligos al ni ankaŭ ekhavi iomete pli grandan kaj dignan kontorĉambron.

C. Støp-Bowitz

AKTUELT!

Fellesreise til Tokio i 1965

I 1964 skal De selvfølgelig delta i Verdenskongressen for Esperanto i Haag. — Opplysninger finnes alt i Esperanto-avisene.

Men det er allerede aktuelt å tenke på reisen til kongressen i Tokio i 1965 (31. juli—7. august), og begynne å spare til den.

Det planlegges en fellesreise med fly av typen SAS DC 8 Jet, som går København—Nordpolen—Anchorage—Tokio på ca. 18 timer. Start fra København 27. juli, hjemkomst ca. 20.—21. august.

Det svenske reisekontor RESO har i samarbeide med UEA planlagt en skandinavisk fellesreise for Danmark, Finland, Norge og Sverige. På grunnlag av fremkomne ønsker har man ment at det er best å gi deltagerne mest mulig tid og anledning til sammen med japanske og andre esperantister å få delta i etterkongress-reiser og til å få se Japan.

Foreløbig har man beregnet utgifter for tiden 27. juli—8. august til 5350 norske kroner. For resten av tiden må man regne med utgifter enten til å reise rundt i Japan eller til forlenget opphold i Tokio, eller en annen by. RESO kan i så fall skaffe hotellværelser i tide. Kongressprogrammet pleier å komme litt etter litt, og da kommer også opplysninger om etterkongress-reiser i Japan.

I ovennevnte foreløbige pris, norske kr. 5350,00, for tiden 27. juli—8. august er iberegnet flybillett begge veier, mat i flyet på førsteklases meny, hotell og frokost i kongresstiden, noen mindre rundturer og hjelp av

reiseleder som kjenner Orienten. — Personlig service og drikkevarer er som vanlig ikke medregnet. Det er regnet med gode hoteller, men for enkeltrom kan det bli litt å betale i tillegg.

Det er en stund til 1965, og det er derfor vanskelig å få nøyaktige priser for flybillettene. Beregningene er derfor basert på billettprisene i dag, med en liten margin for eventuelle forhøyelser. Blir det forandring i prisene, vil dette bli opplyst senere. Det kan også bli forandring i dagene for avreise og hjemkomst, alt etter hva som passer best for deltagerne, for kongressarbeidet, etterkongressarrangementer osv.

De som kan være interessert i å bli med på fellesreisen, må snarest mulig melde fra, så vi får en idé om hvor stor interesse vi kan regne med til den lengste kongressreise de skandinaviske Esperantoforbund har arrangert. Foreløbig anmeldelse, som selvsagt ikke er bindende, må skje snarest til Norsk Esperanto-Forbund, Turisma Servo, Boks 942, Oslo, og kan sendes på et brevkort eller i et brev. Disse foreløbige anmeldelsene vil så bli oversendt herfra til RESO, som så sender de interesserte nærmere opplysninger om reisen og forslag til sparesystem med reisen til Japan som mål.

Som kjent er første periode for å melde seg til kongressen (ikke reisen) i Tokio året 1963. UEA har allerede alligiløjt.

Tokio er midtpunktet i ett av de mest interessante land i Orienten, og dessuten verdens største by, med over 10 millioner innbyggere. I Japan er Østens tradisjoner, skikker og fargerike liv bevart, og i dag blir en fremmed mottatt der med gjestfrihet og vennlighet. Et besøk i Japan vil bli et uforglemmelig minne.

C. Støp-Bowitz

Helsingør

Refoje esperantistoj el diversaj landoj, el diversaj aĝoj kaj el tre diversaj scioŝtupoj pri Esperanto travivis agrablan semajnon en Helsingør. Dimanĉon la 21an de julio ni venis al la ĉarma internacia altlernejo, kie akceptis nin s-ro L. Friis kaj liaj instruistoj.

Antaŭ ol la laboro komenciĝis en la mateno la postan tagon, ni havis solenan ceremonieton. Tiam oni la unuan fojon hisis la esperantoflagon. Lastjare s-ano Ludvig Anjer iniciatis monkollektadon por havigi al la kursoj de Friis tian flagon, kaj la rezulto nun ĝojigis nin ĉiujn.

La studado okazis ĉiun antaŭtagmezon. — Estis entute ses diversaj kursoj, kiuj kovris la bezonon de komencantoj ĝis «lertuloj», kiuj volis perfektigi sian stilon.

La posttagmezojn la partoprenantoj disponis parte al ekskursoj, i. a. unu tagon al la sveda flanko de Øresund kie ni pasigis agrablan vesperon kune kun svedaj geamikoj, parte por privataj celoj. La vesperojn ni pasigis parte en grupoj pli-malpli serioze diskutantaj la diversajn «problemojn» de la mondo ekster kaj de la grupo interna. Kelkajn vesperojn estis ankaŭ prelegoj, filmoprezentado kaj aliaj komunaj aranĝoj.

Entute la semajno donis grandan profiton al la partoprenantoj. Mi vere opinias, ke tiaj aranĝoj estas por nia movado hodiaŭ tre gravaj. Ili ne nur instruas Esperanton kaj edukas esperantistojn, sed same grave estas, ke ni, kiuj longe jam laboris por nia lingvo, havas eblecojn renkonti samideanojn de aliaj landoj, diskuti kaj amuziĝi kun ili kaj ekhavi valorajn kontaktojn. Ni ja ne havas eblon ĉiun jaron partopreni la Universalan Kongreson.

T. Kv.

PRIPENSINDA IDEO :

Kultura kaj komerca interrilato inter Norenaj landoj per Esperanto

Mi ofte pensis pri ideo fokusigi Esperanton al ekzemple du-tri landoj, kiuj antaŭe aŭ ĵus ekhavis kulturajn interrilatojn. Tiam oni ordinare kunlaboras pri reciproka tradukado de libroj, interŝanĝo de instruistoj, ĝelernantoj k.t.p. La lingva ligilo estas aŭ angla, franca aŭ germana. Se la lingvoj de la landoj estas tre malproksimaj de la «mondlingvoj» aŭ tiu interlingvo ĝenerale uzata ne estas komuna por la du landoj, oni povus proponi Esperanton kiel interlingvon. Kompreneble tio devus esti interkonsento inter la reciprokaj registaroj. Kaj ĝi devus havi kiel sekvon la enkondukon de Esperanto kiel unua fremda lingvo en la lernejo.

Ni ne devas iri malproksimen por trovi ekzemplon. Ĝuste en la Norenaj landoj, Islando, Finnlando, Danlando, Svedujo kaj Norvegujo ni havas la ĝustan utiligendan situacion. Oni ja scias, ke oni povas uzi la lingvojn kiel socian rimedon por ligi al si alian landon. La nordaj landoj havas naturajn komunajn interesojn, popolajn, politikajn kaj komercajn kaj sekve ankaŭ kulturajn. Oni proponis kaj preparas la enkondukon de la Islanda lingvo kiel lernobjekto en la altaj lernejoj Norvegaj ĝuste por ligi al si la malproksimiĝantan kaj -intan parencon de la Saga-insulo. Nun oni ankaŭ scias, ke la Islanda lingvo estas ege malfacila lingvo, eĉ por Norvegoj, kies pralingvo ĝi ja iam estis (kun etaj ŝanĝoj, dependantaj de la novaj vivcirkonstancoj en nova ĉirkaŭaĵo, sed tamen preskaŭ senŝanĝa pro la izoliteco dum miljaro). Ĝi inter alie havas 4 kazojn, kiel la germana, kaj verban konjug-

acion. Se la Islanda estas malfacila, la Finna estas eĉ pli, kaj la Finnoj nur sporade lernas skandinavajn lingvojn, ili bazas siajn lingvo-konojn sur la «mondlingvoj», germ., angla, franca kaj rusa. Ili do malproksimiĝas de siaj nordaj fratoj. Kiel malhelpi tion? ... Per enkonduko de Esperanto inter la nordaj nacioj. Per tio oni povas politike, ekonomie, kulture kaj komerce rekolekti la disiĝantajn Nordajn landojn. La «treaty» nature devas esti politika kaj havi kiel sekvon la enkondukon de Esperanto, kiel deviga fako en la lernejoj de la Nordaj landoj. Ciu povas imagi al si la sekvon de tia traktato. Ĝi eĉ povus fari ondojn, kiuj sentiĝus ankaŭ en aliaj landoj en la sama situacio.

Pollando promesis enkonduki Esperanton en la lernejojn, se kvar aliaj landoj faros same. Jen estas la unika ŝanĉo por Nordo, kaj oni havus eĉ 6 landojn kun Esperanto kiel komuna lingvo. En la kvin landoj de la Nordo oni havas (minimume) 7 lingvojn, finnan, svedan, danan, du norvegajn (riks-mål kaj landsmål), laponan kaj islandan.

Nun oni eble volas diri, ke mia ideo estas utopia. Sed ĉu ne ĉiuj novaj ideoj ĉiam estas kaj iam *estis* utopiaj?

Tiajn regionajn interkonsentojn oni poste povus fari ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, kie la cirkonstancoj estus similaj. La landoj devus kuŝi proksime unu de la aliaj por havi plenan kaj maksimalan utilon de la «simbiozo». Inter tiuj «verdaj» insuloj oni poste povus konstrui ponton ampleksantan la tutan mondon.

H. Fridén.



Abundas jam niaj kolegoj, kaj ni provis viziti ĵen unu ĵen alian. Hodiaŭ la organo de la Pola Esperanto-Junularo «Tamen» estas nia celo. Ni ja vivas en la «Jaro de Junuloj». Kion do skribas tiu gazeto?

En longa artikolo Jan Smykalski preparolas «NERIMARKATAN PROBLEMON PRI ...» — kaj eĉ se la problemo ankoraŭ ne estas la nia, ni devas iom cerbumi pri ĝi. Temas pri: «Kio okazas kun tiuj esperantigitaj ĝelernantoj, kiuj forlasas sian lernejon; kun kiu ili korespondas; kion ili legas en Esperanto kaj kion ili havas por sia esperanta dispono; nu, kaj fine, kie ili ĝenerale estas?»

Kompreneble ni ne povas citi la tutan artikolon. La aŭtoro montras al la fakto, ke en la lerneja jaro 1961/62 en Pollando lernis Esperanton 2900 ĝelernantoj! Ili do jam proksimiĝas al tio, kio estas nura revo ĉe ni! Sed ĵen venas problemoj! Kelkaj — kiel la organizaj reguloj ktp. estas polaj specialaĵoj, sed aliaj — la jam menciitaj — estas komunaj, aŭ estos, se ni ne antaŭe solvos ilin.

«Konkludo: Nek PEA (aŭ NEL?), nek PEJ, nek skolta, vilaĝa kaj cento da diverstipaj aliaj organizaĵoj kaptis la iniciativon en siajn manojn.»

Ankaŭ la posta rimarko, estas pesimisma: «De tempo al tempo, en E-gazetoj oni trovas anoncojn, en kiuj oni invitas ĝelernantojn al korespondado. Bedaŭrinde, tia korespondado

plej ofte ne sukcesas, ĉar mankas junaj korespondantoj.»

Kaj: «Treege grava problemo en la vivo de esperantigita lernanto estas legado en Esperanto. Estas senripoĉa vero, ke lernanto, precipe en Pollando, suferas pro komplete manko de infana kaj lernanta legaĵo, konforma al lia ekintereso, kapableco kaj pensmaniero.

«Esperanto por lernanto fariĝas io abstrakta, ne apogita sur konkretaĵo en formo de taŭga infana kaj junulara «literaturo»: malkaraj, bele ilustritaj periodaĵoj, similaj al la naci- aŭ fremdlingvaj eldonaĵoj en la lando; malkaraj, popularaj, facile legeblaj libretoj ..., nu kaj kio estas treege grava, aĉeteblaj publike en gazet-butikoj, kaj ne nur en fermitaj lokoj de E-organizaĵoj, pri kiu scias nur malmultaj homoj.»

Post tio ni vere bezonas ion lumigan, pri kio ni povas fiereti: Svisa Espero (3/63) informas:

«Eble vi scias, ke la encikliko de Johano XXIII «Pacem in terris» baldaŭ aperos en Esperanto. Sed ĉu vi scias, ke la Esperanto-teksto estos disdonita al ĉiuj partoprenantoj en la dua parto de la vatikana konsilio, kaj havos latinlingvan enkondukon speciale redaktitan por altiri ilian atenton sur la eblecojn de nia lingvo?»

Korespondu!

Gejunuloj de litova E-klubo «Juneco», plejparte studentoj, volas korespondi kun ĉiuj landoj, precipe Skandinavaj, pri ĉiuj temoj. Nia adreso: E-klubo «Juneco», a/d-16, Vilnius C, Litovio, USSR.

«Nuntempa Bulgario», str. Levski 1, Sofio, Bulgarujo, publikigas senpage anoncetojn de korespondado por akceli la interpopolan amikecon.

Esperanto en radio

CIUTAGE

16.30-17.00 Warszawa: 200 m; 42,11 m;
41,27 m; 31,50 m; 31,45 m;
31,01 m; 25,42 m; 25,19 m.

DIMANĈE

20.00-20.25 Sofia: 48,62 m; 39,11 m.

LUNDE

0.30- 0.55 Sofia: 31,38 m; 25,32 m

13.20-13.30 Bern: 48,66 m; 31,46 m;
13,94 m.

18.15-18.30 Valladolid: 203 m

23.40-23.55 Hilversum: 298 m; 402 m.

MARDE

17.50-18.00 Wien: 577 m; 514 m;
293 m; 25,45 m.

18.55-19.10 Roma: 50,34 m; 41,24 m;
30,90 m.

MERKREDE

13.20-13.30 Bern: Kiel lunde

18.15-18.30 Valladolid: Kiel lunde.

18.55-19.10 Roma: Kiel marde.

JAŬDE

07.00-07.15 Gdansk: 203 m.

09.35-09.45 Paris: 208 m; 235 m;
242 m; 222 m.

18.45-19.00 Praha: 233 m (nur la last-
an jaŭdon en la monato).

22.15-22.25 Bern: 48,66 m; 31,46 m;
31,07 m; 25,16 m.

23.05-23.30 Zagreb: 264 m.

VENDREDE

00.00-00.10 Valencia: 193 m.

11.00-12.10 Praha: 49 m; 41 m; 31 m.

18.15-18.30 Valladolid: Kiel lunde.

18.55-19.10 Roma: Kiel marde.

23.00-23.10 Hilversum: 298 m; 402 m.

SABATE

22.15-22.25 Bern: Kiel jaŭde.

ADRESOJ :

Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio,
Warszawa, Polujo.

Radio Sofia, Bulgario.

Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr 1,
Bern, Svisujo.

Radio Valladolid, Hispanujo.

N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum,
Nederlando.

Radio Wien, Argentinierstr. 30 a,
Wien IV, Aŭstrujo.

Radio Roma, Casella Postale 320,
Roma, Italujo.

Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk-
Wrzeszcz, Polujo.

Esperanto Office, Orléans (Loiret),
Francujo.

Radio Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Radio-Zagreb, Jugoslavio.

La Voz de Levante, Valencia, Hisp.

Cetere disaŭdigas Esperantajn pro-
gramojn ankaŭ la radioj de Pjongjang,
Norda Koreujo, Rio de Janeiro, Re-
sende, Volta Redonda kaj Teresina,
Brazilo, Guatemala.

*

Aŭskultinte al bona programo, nepre
skribu al la radiostacio en Esperanto.
Ne nur via dankesprimio estas bon-
vena, sed ankaŭ la nura informo, ke
la programo estas aŭdita, kaj informo
pri la kvalito de la ricevo en via loko.

Bonvolu legi:

Poŝtmarkoj

Ĉar preskaŭ en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj
en la tuta mondo estas organizaĵoj
de kolektantoj de uzitaj poŝtmarkoj,
tial estas treege utila, urĝe necesa kaj
unika agado, ke ĉiu esperantist(in)o
kie ajn ŝi aŭ li loĝas en la mondo,
klopodu akiri gravan kvanton da
uzitaj poŝtmarkoj de geamikoj kaj
familianoj por poste povi sendi la
tutan kvanton prefere en registrita
letero al sinjoro P. Zacho, Randbøl-
vej 4, Kopenhago F, Danlando, kiu
ja vendadas konstante uzitajn poŝt-
markojn por daŭre povi subteni mone
la karavanon de Amikeco en Afriko.

Konsideru, ke ĝi postulas vere tre
oferemanlaboron de sinjoro P. Zacho,
sekve estas utile ke ni ankaŭ faru ion.

Provo pri spac-vojaĝa
leksikono

ABLACIO, tekniko por protekto de
spacŝipoj kontraŭ ardiĝo dum re-
turno al la atmosfero. Varmo ab-
sorbiĝas per vaporigo de la materi-
alo kovranta la surfacon de la ŝipo.

ABSOLUTA NULPUNKTO,
plej malalta temperaturo atingebla,
÷ 273,16 ° C.

AKCELO, kresko de rapideco (po
tempunuo) ekz. metro po sekundo
(m/sek².)

Ofte indikita per la unuo g.

ANDØYA-PROJEKTO,

norvega raket-bazo en Vesterålen,
N. Norvegujo. Raket-tipo: am., du-
ŝtupa Nike-Cajun. Detalaj esploroj
de nordlumo kaj ĝia efiko sur la
radio-komunikado tra la jonosfero.

APOGEO, en satelita orbito, punkto
plej malproksima de la tero
(kp. PERIGEO).

APOLLO, trivira spacŝipo evoluata
en USA por esploro de la luno.

ASTEROIDOJ, ĉiel-korpetoj en la
sun-sistemo, ĉefe inter la orbitoj
de Marso kaj Jupitero. Ca. 2 000
registritaj. La plej granda, Cereso,
havas diametron de 780 km.

ASTRONAŬTO, spacvojaĝanto.

ASTRONAŬTIKO, scienco k. tekniko
ligita al konstruado, konstruado,
elsendo kaj navigado de virumitaj
aŭ senpilotaj satelitoj kaj spacŝipoj.

ASTRONOMIA UNUO, mezur-unuo
de longo responde al la meza dist-
anco inter suno kaj tero. (v. *Dist-
ancoj en spaco*).

ATLASO, am. 1½ ŝtupa interkonti-
nenta balistika projektilo. La porta
raketo estas uzita i. a. por elsendo
de la Mercury-kapsuloj Friendship
7 kaj Aurora 7.

ATMOSFERO, gastavolo ĉirkaŭ ĉiel-
korpo. La dikeco dependas de la

UNESCO-novaĵoj

Sveda helpo por evoluantaj landoj

La sveda registaro sendas al Hindujo,
Birmo, Indonezio kaj Pakistano 11 500
tunojn da papero uzota por la farado
de lernolibroj. La unua sendaĵo for-
iris per ŝipo de Gotenburgo, Sunds-
val, kaj Gävle je la komenco de
decembro 1962. La kontribuo estas la
unua etapo en programo de helpo al
evoluantaj landoj, kiun la sveda par-
lamento aprobis dum sia printempa
sesio.

La homo tra sia arto

En la kadro de la Granda Projekto de
Unesko por la reciproka apresado de
orientaj kaj okcidentaj kulturaj va-
loroj internacia grupo de kleruloj kaj
arthistoriistoj prilaboras novan serion
de artilibroj titolitan «La homo tra sia
arto». 14 apartaj volumoj aperos en
periodo de sep jaroj pri 14 apartaj
temoj: Milito kaj Paco, Muziko, Na-
turo, la Homo Laboranta, La Homa
Vizaĝo, Festoj, la Vizio pri la Feliĉ-
ego, Amo kaj Geedzeco, Helpemo,
Morto, Homo kaj Besto, La Familio,
Revoj kaj Fantazio, kaj Sperto pri
Dio. — Ĉiu volumo enhavas dudek
elpreneblajn bildojn 90 × 23 cm. kaj
kostas proksimume 40 stelojn.

*Tutmonda Teatriva Kongreso
okazos en Varsovio*


La deka Tutmonda Teatriva Kon-
greso organizita de la Pola Centro de
la Internacia Teatro-Instituto okazis
en Varsovio en junio 1963. Pli ol du-
cent dramverkistoj, reĝisoroj, aktoroj,
dekoraciistoj, recenzistoj, kritikistoj
kaj teatrohistoriistoj el kvindek land-
oj partoprenis.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Infoservo

konsisto, gravitforto de la globo
kaj la temperaturo.

H. Fr.

På norsk



Esperanto i franske skoler

En statistikk som nylig er offentliggjort, viser at det i skoleåret 1961—62 var i alt 1512 skoleelever som fikk undervisning i Esperanto i franske skoler.

Det ble undervist i Esperanto i 8 folkeskoler, 25 realskoler og yrkesskoler, 33 gymnasier og lærerskoler.

Polske Esperanto-programmer

Den polske radioen sender hver dag et halvtimes program på Esperanto fra klokken halv fem. Programmet går ut over 7 bølgelengder i kortbølgebåndene 31. 42 og 49 meter og over en mellombølgesender på 200 meter. Bølgelengden på 200 meter er nylig tatt i bruk og gir i alminnelighet god mottagning i Norge.

Utenom de daglige nyheter og kommentarer til disse skifter programmet mellom musikk, kåserier om polsk litteratur, teater og film, orientering om det økonomiske liv i Polen, ønskeseksert, brevkasse og barnetimer. I likhet med Esperanto-sendingene fra andre land bringer også de polske sendingene nyheter fra Esperanto-verdenen.

Bokserie på to språk

MacLellan-forlaget i Glasgow har begynt å gi ut en serie verker som skal presentere engelsk, skotsk og Esperanto-litteratur. I hver bok skal det være to parallelle tekster, én på Esperanto og én på engelsk eller skotsk. Den første boken i serien er «Kjærlighetens Ahasverus» av den ungarske dikter Kaloman Kalocsay, gjendiktet på engelsk av Marjorie Boulton.

Esperanto-undervisning i flere land

Undervisningsministeren i Hellas har offisielt tillatt undervisning i Esperanto som valgfritt fag i landets skoler og universiteter.

Regjeringen i Guatemala har besluttet å gi landets Esperanto-forbund tillatelse til å undervise i Det internasjonale språket i en forsøksperiode på tre år for alle realskoleelever i hovedstaden, som velger Esperanto istedenfor engelsk eller fransk.

Rektor ved universitetet i Szeged i Ungarn har godkjent Esperanto som studiefag for 1963—1964.

Ved to gymnasier i Polen, i byene Sosnowiec og Cracovie, er Esperanto obligatorisk fag.

Ved universitetet i Caracas, Venezuela, er det satt i gang kursur i Esperanto.

I New-Zeland lærer 500 barn Esperanto ved forskj. skoler i Tweedsmuir, Hawera, Auckland og Wellington.

Oslo-film på Esperanto

Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn har latt endel kopier av sin film «Velkommen til Oslo» tale inn på Esperanto. Det er stor interesse for denne utgaven av filmen, og anmodninger om å få låne den strømmer inn fra alle kanter av verden. Filmen vises på møter i Esperantoforeninger, på esperantistenes landsmøter og i organisasjoner og institusjoner som har tatt i bruk det internasjonale språket.

Nylig ble en kopi på anmodning sendt til Sør-Afrika og ble vist ved sammenkomster i Johannesburg og Cape Town. Derfra ble den sendt videre til den portugisiske koloni Moçambique, hvor den ble vist på et stort møte i hovedstaden Lourenço Marques og vakte betydelig oppmerksomhet. Ved samme anledning ble det besluttet å opprette et eget Esperanto-forbund i Moçambique.

SENSACIAJ REZULTOJ

Novelo de Willy Breinholst

Personestro Finkelsten prenis profundan elsuĉon de la cigaro, apogis sin malantaŭen en la seĝo, ekzaminante dum momento penetreme la junan virinon sidantan antaŭ li.

— Ĉu vi aspiris dungigĉon en la robo-sekcio de nia magazeno, fraŭlino Berglund? li jen diris.

— Jes, fraŭlino Berglund fervore ekbalancis la kapon. — Sed tute ne estas necese ke temu pri roboj. Mi havas sperton ankaŭ pri subvestaĵoj por virinoj, tualetartikloj kaj infanvestaĵoj.

Finkelsten prezentis al ŝi cigaredon.

— Nu, aŭdu, fraŭlino Berglund. Kiel vi eble scias, ni dungas plurajn centojn da homoj ĉiujare, kaj mi sukcesis efektiviĝi ke ĉiuj — absolute ĉiuj, kaj tio koncernas nian malnovan stabon kiel ankaŭ ĉiujn novajn alvenontojn — submetiĝu al psikologia-psikoteknika provo, antaŭ ol ni decidis kie la koncerna persono lokiĝu, kaj kie li aŭ ŝi — laŭ la rezulto de la ekzameno — utilos plej multe. Ĉu vi havas ion kontraŭ trapaso de tiu ĉi ekzameno, fraŭlino Berglund?

— Sed mi jam ĉiam estis vendistino je roboj, subvestaĵoj por virinoj k.t.o. Mi scias, ke estas tio kion mi kapablas plej bone.

Finkelsten forigis ŝiajn argumentojn.

— Ne diru tion! Nia psikotesto donis tute mirigajn rezultojn. Mi memoras junan knabinojn serĉantan okupon ĉe ni kiel liftgvidistino. Mi igis ŝin trapasi nian psiko-teston. kaj ŝi malkovris, ke estus krimo permesi al ŝi stari de mateno ĝis vespero en lifto. Ŝi estis klera persono, kaj hodiaŭ ŝi estas mia sekretariino. La plej bona sekretariino, kiun mi iam havis.

Mi povas mencii alian ekzemplon. Viro aspiris sezonan laboron tie ĉi kiel kristnaska koboldeto. Li trapasis nian psiko-teston. Ĝi malkovris ke li posedas tute neordinaran talenton por vendo. Hodiaŭ li estas estro de nia konfekcia sekcio por viroj. Gajnas siajn 40 000,— kronojn jare. Kiom vi kredas, ke li gajnus kiel kristnaska koboldeto?

— Sed, se mi nun trapasus vian psiko-teston, kaj se montriĝus ke mi kapablas plej bone kiel liftgvidistino — kio do?

Finkelsten levis la ŝultron.

— Tiuokaze fariĝus eble malfeliĉa rezulto por vi, fraŭlino Berglund. Sed estas necese ke vi provu rigardi la aferon de nia flanko. Ni ne povas dungi en nia sekcio por roboj ekspedistinojn kiuj ne havas la necesajn kvalifikojn. Ni devas sekuriĝi al ni 100 procentojn da efektiva laborhelpe... kaj tion ni faras helpe de nia psiko-testo.

— Kaj kion ĝi celas?

— Ĝi konsistas tute simple el kelkaj reakciaj mezuroj laŭ la nomata Gitzbaum-sistemo uzata hodiaŭ ĉie en la mondo. Ĝi estas via garantio por ke vi atingu la ŝustan fakon tie ĉi surtere, malgranda fraŭlino Berglund.

— Ĉu vi mem trapasis la ekzamenon, sinjoro Finkelsten?

— Kompreneble! Mi konfidis al vi sekreton. Mi alvenis tien ĉi la unuan fojon kiel okaza fenestra poluristo. La tiama ĝeneraldirektoro de la magazeno, s-ro Gitzbaum, ĝis ellaboris la sistemon — el tio la nomo — kaj li estis arda por ekprovi ĝin. Mi pendis ekster la fenestro polurante, kaj li faris signon ke mi eniru internen. Unu horon poste mi trapasis

Kiel oni povas memori la 15-an datrevenon de la Deklaracio de Homaj Rajtoj

1. Dediĉi apartan atenton al la Deklaracio dum unu el la kunsidoj aŭ kunvenoj en decembro, kiel eble plej proksime al la 10-a de decembro. Oni povas kunligi la celebradon kun la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. La memorigo povas konsisti el pli aŭ malpli longa prelego, aŭ pli ampleksa aranĝo kun prezento de unuopaj liberecoj kaj rajtoj, precipe tiuj rilatantaj la edukadon kaj kulturan vivon. La teksto de la Deklaracio aperis en la novembra n-ro de «Esperanto» kun enkonduka artikolo, kaj ĝi estos publikigita ankaŭ kiel aparta broŝureto. Informojn por la prelego oni povas ĉerpi el la ĉapitro VIII de la libro «Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo» aŭ el alia bona fonto.

2. Distribui la esperantlingvan tek-

la ekzamenon — kun tiom brila rezulto, ke mi tuj estis dungata kiel personestro! Pli poste, kiam la provo iĝis deviga al ĉiuj tie ĉi en nia granda firmo, mi krome ekhavis ankaŭ okazon submetigi al la provo la ĝeneral-direktoron Gitzbaŭm, kaj —

Iu frapis singardene la pordon.

— Envenu!

— Maljuna, iom kurbnuka viro kun broso kaj vestita per laborantaŭtuko eniris por malplenigi la cindrujon kaj la paperkorbon. Li interesite ekrigardis la grandan cigarstumpon kiun Finkelsten formetis sur la marmoran leterprenilon.

— Ĉu mi rajtas preni ĝin, sinjoro Finkelsten?

La personestro bonhumore kapjesis. — Jes, bonvolu, Gitzbaŭm, li diris.

Esperantigita de
Rudolf Dreyer

ston de la Universala Deklaracio kaj, eventuale, aliajn materialojn, el kiuj aparte taŭgaj estas la fotoafiŝoj eldonitaj de UNESCO en Esperanto kaj havigeblaj de la C. O. de UEA senpage.

3. Publikigi almenaŭ mallongajn artikolojn en ĉiuj esperantlingvaj gazetoj.

4. Prizorgi ke la tutlanda kaj regiona nacilingva gazetaro raportu pri la aranĝoj aŭ publikigu artikolojn pri la Homaj Rajtoj.

5. Okazigi prelegojn en la universitatoj kaj lernejoj, en neesperantistaj kulturaj societoj, aŭ memorigi la datrevenon okaze de religiaj ceremonioj, precipe en predikoj. Ĉiu profesoro, instruisto, pastro, ĵurnalista aŭ alia aganto en kontakto kun pli vasta publiko povas facile utiligi sian pozicion por memorigi la datrevenon.

6. Honorigi unuopulojn aŭ grupojn, kiuj estis aparte aktivaj en la diskonigo de la Homaj Rajtoj kaj Liberecoj, per specialaj mencioj, diplomoj aŭ simile.

7. Se en la lando, regiono aŭ loko formiĝis specialaj komitatoj por celebrado de la datreveno, aliĝi al tiuj komitatoj, partopreni en iliaj aranĝoj, kontribui ĝis maksimumo al la sukcesigo de la celebrado.

8. *Nepre sendi* telegramon aŭ mallongan leteron al la Sekretariato de U.N. kaj al la Sekretariato de UNESCO kun esprimoj de bondeziroj. La leteroj aŭ telegramoj estu aŭ en la laboraj lingvoj (angla, franca, hispana, rusa) aŭ en Esperanto. La adreso de U.N. estas: United Nations, New York. Tiu de UNESCO estas: U.N.E.S.C.O., Place de Fontenoy, Paris 7 e.

Belarta Konkurso de UEA 1964

Ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkurso 1964, la dekvina en la serio.

LITERATURAJ BRANĈOJ:

1. *Originala Poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. *Tradukita Poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj, tamen la komisiono rezervas al si la rajton fari escepton en tiu postulo, se temas pri traduko el ia literaturo — ekz. la japana — kies poemoj estas esence mallongaj).
3. *Originala Prozo* (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2000 ĝis 3000 vortoj).
4. *Originala Drameto* (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radio-dialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 49-a Universala Kongreso en Hago. En la sama kunsido oni laŭtleĝos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj mon-premion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj; tamen la komisiono rajtas reteni premion aŭ premiojn, se ĝia opinie la cirkonstancoj tion postulas.

NOVA TALENTO: La komisiono ankaŭ aljuĝos diplomon kaj monpremion al tiu persono, kiu sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en tiu ĉi konkurso nek en la dek kvar antaŭaj.

ĜENERALAJ REGULOJ

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 49a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA. Tamen, ĉe verkisto loĝanta en lando, kie plenumo de tiu kondiĉo estas ekstreme malfacila, oni laŭ bon-

trovo allasos konkursaĵon akompanatan de klarigo pri la cirkonstancoj.

2. La konkursa kotizo (sendepende ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj, 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas neebla, la partopreno estas senpage.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe branĉo 2 (tradukita poezio) oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj aperos laŭeble en la revuo «Esperanto» aŭ en «Monda Kulturo», kaj sen la permeso de la redaktoroj de tiuj organoj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj, kaj la komisiono aparte petas, ke oni sendu *klarajn* kopiojn, ĉar malklaraj kopioj multe malfaciligas la juĝadon. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita. Oni ankaŭ skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kun aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de UEA. Eventuale, oni aldonu klarigon laŭ la senco de la dua frazo de regulo 1.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipojn, eventuale respondkuponojn, ktp, al la Sekretario: S-ro William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Skotlando.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de majo 1964.


KRUCVORTENIGMO

HORIZONTALALE :

1. Hermetika vesto
8. Diktaĵo
15. —edo, greka sciencisto †
16. Pratempa
18. — festeno estas veneno.
20. —agoj, popolo menciita en la Odiseado
21. Nenia —o sen pago
22. Piedvest', inversite
23. Surplis'
24. Scienca sufikso
25. Ŝminko
28. Naciano
31. Sufikso
32. Prefikso, inversite
34. Sledo
36. Bakaĵo
38. Unutaga
39. Galinulo
41. Part' de la korpo
42. Utila libro
45. Tropika vent'
46. Finaĵo
47. Panrostaj'
48. Antaŭeniĝi sur glata supraĵo
50. —u vin per sakaĵo
52. Du egalaj
54. Imito
56. Aŭdebla aervibrado
57. Lerneĵ'
60. Prepozicio
61. Trafi per la vizaĝo en la —.
63. Granda vilaĝ'
64. Sufikso
65. Malgranda luno
67. —a, finaĵo
68. Ekstremorienta arbo
71. Trunk'
72. Finaĵo
74. Nombro
75. —to, presprocedo
76. —i, moviĝi
77. Dekoraciisto
80. Pronomo
81. —a, altvalora pro sia malofteco
83. Spec' de valso
84. Pronomo
85. Artifika
86. Pli malpli kompleta kaj klara ideo, kiun oni havas pri io aŭ iu

VERTIKALE :

1. Kombinaĵo de acido kun bazo
2. Fotografio en naturaj koloroj
3. Drampart'
4. Preskaŭ frivola
5. —ro, antikva, ronda konstruo
6. Manĝaĵo
7. Sufikso
8. Supernatura estaĵ
9. Fiŝgluo
10. Proporcio part' de tuto
11. Flar—, maĉ—
12. Du egalaj
13. Metala
14. Glavo
17. Kiel 18
19. —i, lubriki
21. Kovrita de arboj
26. Necesa parto de pordo
27. Najbaroj
29. Batali
30. Granda ŝtono, inversite
33. Frukta
35. Akvopipon
37. — kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita
38. Planto
40. Ligitubero, inversite
43. Greka verkisto †
44. —vo, hejtoforno
49. Pli ol sufiĉe
51. Muzikpeco
53. Sufikso
55. Bild'
56. Finaĵo, inversite
58. Bird'
59. Negativa
61. Universo
62. Kiel 47
66. Longa, dika lignopeco
67. Sufikso
69. —a, kapabla
70. Kava rel'
73. Kvant' da varoj
75. Pronomo
78. Sufikso
79. Frakcio
82. Najbaroj



Solvojn sendu antaŭ la 1-a de marto 1964.

RECENZOJ

Feliĝigaj Ferioj. Kajero verkita de Hugo Kraus, eldonita de Turisma Societo, Primošten.

Jen granda, bela, fotoriĉa turisma informilo, kies ĉeftitolo kaj ĉeflingvo estas Esperanto, sed kun subtitoloj kaj resumoj franclingvaj kaj germanlingvaj.

Domaĝe, ke la feria tempo jam pasis, kiam tiu bela kajero alvenis. Kaj domaĝe, ke tiu idilia «Esperantogolfo» situas tiom fore de nia hejmlando, tiel ke la tien-reen vojaĝo estas multkosta.

Oni ne povas diri, ke la restado estas multkosta. Oni povas elekti inter tendoj kaj domoj. Kaj krom la moderaj prezoj oni donas al esperantistoj *kaj iliaj amikoj* specialan rabaton!

Haro.

Homo kaj Kosmo aperis kun sia dua numero, same intereskapta kiel la unua. Oni povas legi pri la rezultoj de la esploroj de la artefaritaj satelit-oj. Oni povas studi mallongajn kurozojaĵojn el la naturo. Ekzemple pri la vere miriga maniero kapti serpent-ojn: La ĉasisto devas sin glutigi ĝis la brakoj, antaŭ ol liaj kamaradoj mortigas la serpentegon. Tiel oni ne devas trabori la haŭton de la serpento, — kaj la haŭto ja estas la valorajaĵo.

Kristana Kulturo.

IKUE-kajeroj 1 kaj 2.

N. G. Hoen: Emile Peltier.

J. B. Hirscher: Sintrompoj.

Prezo: Po 6 steloj.

Okaze de sia 60-jara ekzisto, la gazeto Espero Katolika komencis eldonadon de kajeroj, sub titolo Kristana Kulturo.

La unuan n-ron ĝi dediĉas al Emile

Peltier, la katolika pastro kiu jam antaŭ 60 jaroj ne nur fondis tiun gazeton, sed ankaŭ iniciatis la fondiĝon de la katolika esperanto-movado.

La dua numero estas traduko de preskaŭ cent-jara germana verketo, de la profesoro pri katolika moral-teologio Hirschener. En tiu la profesoro donas sian scion kaj sian sperton pere de tre mallongaj, sed treege trafaj karakterizoj de la homoj. Oni sentas sin senmaskigita kaj komprenas, ke la bonaj agoj ne estas tiel bonaj, kiel oni sintrompe imagas al si.

La lingvaĵo de ambaŭ kajeroj estas bona. La aspekto plaĉa. La prezo modera. Oni povas esperi pri pliaj kajeroj, same bonaj, kaj — eble — el pluraj flankoj de la vivo kaj kulturo.

Haro.

Seiho Nishi: Nia korpo. Anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj. Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, Japanujo, 106 p., broŝ. Prezo 1,20 us. dol. Eksportata ekskluzive de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1, Tokio.

La papalagoj. Paroladoj de la oceania tribestro Tuiavii de Tiavea. — Esperantigitaj de F. Faulhaber. Eld.: Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo, kaj Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E., Amsterdamo. Kontrolita de la Literatura Komitato. 80 p., broŝ. Prezo: 2 guldenoj.

La Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio. Eld.: La fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 133 p., broŝ. + 13 grandaj mapoj.

Refoje pri la malakordoj inter K-do Togliatti kaj ni. Pri kelkaj gravaj problemoj de leninismo en la nuna tempo. Eld.: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 190 p., broŝ.

CARL STØP-BOWITZ

50-jara



Unu el la plej eminentaj esperantistoj en Norvegujo, lektoro Carl Støp-Bowitz, prezidanto de NEL, naskiĝis en Eidsvoll la 8an de decembro 1913. Post la gimnazio li komencis studi natursciencan kaj matematikan ĉe la universitato en Oslo, kaj en 1939 li fariĝis licenciato pri naturscienco, kun zoologio kiel specialaĵo. Li faris multajn studvojaĝojn en diversaj landoj kaj ricevis plurajn stipendiojn por zoologiaj esploroj. En franca lingvo li eldonis plurajn zoologiajn verkojn, ĉiam kun Esperanta resumo.

Lia vivo kiel esperantisto komenciĝis merkrede la 21an de novembro 1928 je la 19.30. Tiam li por la unua fojo aŭskultis la perradian kurson, kiun gvidis tiama leŭtenanto Rolf Bugge Paulsen kune kun nederlanda fraŭlino T. Kissing. La kurso komenciĝis jam en oktobro la saman jaron.

En junio 1930 Støp-Bowitz partoprenis la grandan kurson en Oslo de

pastoro Andreo Ĉe. Tiu kurso daŭris nur du semajnojn, sed po 4 horojn ĉiutage! Tamen post tiu kurso li kapablis paroli lingvon preskaŭ tute flue. En la aŭtuno 1930 li aliĝis al Klubo Esperantista en Oslo kaj fariĝis ties sekr. 1931—38, vicprez. 1939—40, prez. 1940—47 kaj sekr. 1947—62.

Jam en 1933 Støp-Bowitz fariĝis sekr. de NEL kaj funkciis ĝis 1947, nur kun kelkajara interrompo (1937—39), tiam kiel ĝen.sekr. De 1947 li estas prez. de NEL.

Estas ĉi tie neeble menciigi ĉion pri lia multflanka kaj energia laboro por Esperanto, mi volas nur noti kelkajn ĉefajn faktojn: Li estis prez. de ISAE 1946—49 kaj ties vicprez. de 1949. Sekr. de Ekzamena Komisiono de NEL 1939—45 kaj prez. de 1945. Prez. de LKK de la UK en Oslo 1952. Membro de Akademio de Esperanto de 1949 kaj direktoro de ĝia Sekcio pri Prononcado. Komitatano B de UEA de 1956. Gvidanto de Lerneja Kampanjo de NEL kaj instruadis oficiale Esperanton en gimnazio de Aars & Voss en Oslo 1961. Li ankaŭ reprezentas NEL-n en Nordlanda Esperanto-Komitato. Kune kun s-ro Isbrucker li verkis la libron «La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato» (Oslo 1948). Li estis kunlaboranto en pluraj vortaroj kaj ĉeflaboranto (pri zoologio) de la aperonta Plena Ilustrita Vortaro.

Li gvidis multajn kursojn, verkis artikolojn, faris paroladojn — ankaŭ per radio — kaj prelegis en ISU dum pluraj UK. En 1956 li fariĝis Komandoro I de la ordeno de NEL, PRO MERITO, kaj estas Majstro de la ordeno de 1956. Li ankaŭ estas Majstro de la ordeno La Verda Pantoflo de Klubo Esperantista.

Støp-Bowitz estas tielnomita ĝisosta esperantisto kaj dediĉas ĉiun liberan minuton al la laboro por Esperanto. Li iam skribis ke «tago sen Esperanto

Esperantista skiferio en Adelboden, Svislando

26-an de decembro 1963 — 4-an de januaro 1964

ADELBODEN estas skistacio en la Bernaj Alpoj alta je 1400 m.

Por la sepa fojo ni organizas skiferion, ĉar la pasintaj ĉiam majstre sukcesis. Ni donas al vi ĉi sube la necesajn informojn:

AĜO: de la 16-a jaro, kaj ĝis kiam oni ne plu sentas sin sportema!

LOĜEJO: simpla, bela ĉaledo (alpa lignodomo) en la koro de fame konata skiparadizo nin atendas. Ĉiuj helpas por la interna doma laboro: kuirado, purigado... Por la tranoktado estas pajlomatracoj kaj litoj.

PROGRAMO: skiado; glitŝuado, ekskursoj; vespera programo kun: interkona vespero, prelegoj kaj diskutoj pri Monda federalismo estonteco de Esperanto, gramatikaj demandoj, novjaro, reĝfesto... (alportu diapozitiv-ojn pri viaj ŝatokupoj, vojaĝoj...)

PREZO: por la tuta restado: svisaj frankoj 105,— (330 steloj). Estas enkalkulitaj loĝado, hejtado, manĝoj. Asekuro kontraŭ skiakcidentoj estas deviga kaj kostas sv.fr. 11,— por tuta restado aŭ sv.fr. 7,50 minimume. Por la jam asekurigitaj personoj oni nepre postulas pruvilon, ke la ski-riskoj estas asekurigitaj. (Ne enkalkulitaj veturilkostoj: skiliftoj, seĝliftoj, aŭtobusoj). Por parta partopreno de almenaŭ tri tagoj (se estas loko): po tago sv.fr. 13,50 (42 steloj).

estas perdita tago por mi», kaj li vere sekvis tiun devizon!

La tuta esperantistaro en Norvegujo elkore gratulas lin, dezirante al li agrablan festotagon kaj daŭran fort-on por ankoraŭ multjara agado por Esperanto.

LKH

AVERTO: tiu skiferio estas organizata por esperantistoj aŭ por Esperanto-komencantoj, kiuj deziras ellerni la internacian lingvon. La komencantoj devas antaŭ la skiferio almenaŭ esti trastudintaj gramatik-lernolibron. Ni ne plu akceptos tiujn profitemulojn, kiuj klaĉas la tutan tagon nacilingve, kaj tiel malhelpas tiujn, kiuj ŝatus lertiĝi en la Esperanto-praktiko. Ni preferas esti malplimulte nombraj sed havi veran samideanan atmosferon.

ADRESOJ: por aliĝi skribu al Co-sette Giroud, Jonquilles 8, La Chaude-Fonds (Svislando). Dum la ski-restado la adreso estos: ESPERANTO, Chalet Egghaus, Boden, Adelboden (Svislando).

ALIĜO: bonvolu aliĝi kiel eble plej rapide per poŝtkarto kie vi mencias vian nomon, antaŭnomon, sekson, adreson, naskiĝdaton, profesion, alventagon kaj forirtagon kaj eventualajn rimarkojn (se vi ŝatus prelegi, se vi alportos kolorkliŝojn, se vi deziras ricevi informojn pri la luprezoj de skioj kaj glitŝuoj...)

Bonvolu skribi preslitere. Antaŭpagu samtempe sv.fr. 30,— (100 stelojn) al poŝtĉekkonto: Claude Gacond, Instruisto, La Sagne Ne (Neuchâtel) IV 6151. Aliĝo nur valoras post la ricevo de la antaŭpago. Nia ĉaledo ne estas elasta, do tuj aliĝu kaj ne hezitu ĝis kiam lokoj estos rezervitaj!

PLIAJ INFORMOJ: en decembro ni sendos cirkuleron al la aliĝantoj kun indikoj pri la detala programo, luprezoj de skioj, glitŝuoj, veturilprezoj....


 Poezia paĝo
 

Herman Wildenvey:

EN PENSOJ

Promenis prioro en paca ĝarden',
profunde pri Dio li pensis.
Ŝteliris knabino tra mola razen'
amaton viziti intencis.

Prioro knabinon ekvidis ĉe l' heĝ'
kaj trovis ŝin loga, tre bela.
«Infano, vi ĝenas prioron en preĝ',
li preĝas al Dio ĉiela.»

«Survoje mi estis al mia trezor',»
ŝi diris kaj kapon tuj klinis.
«Mi pensis pri li, vin entute ne vidis,
sed estas ja strange, ke vi, prior',
pensante pri Di', havas min en kor'!»

Trad: LKH

★

Sigbjørn Obstfelder:

PRINTEMPO

«Mine teknikerdage» 1890)

Diablo prenu gisfer-kolonojn!
Diablo prenu gisfer-kolonojn!
Sss... kia ĉiela laceco,
fe... liĉa lac... eco!
Ruĝo en verdo, verdo en ruĝo,
verdo en verdo!
Abutmentaj fortoj?

Diablo prenu abutmentajn fortojn!
Diablo prenu abutmentajn fortojn!
La ino, kiu tie iras,
ĉu funebras?
Ŝi vestu sin en blu', anemona,
la ĉapelo, ranunkole!
Laminataj lagroj!

Diablo prenu laminatajn lagrojn!
Diablo prenu laminatajn lagrojn!
Varmo kaj... berberisoj kaj...
sunombreloj kaj...
kaj papilioj kaj...
kaj arĝent' aere, arĝent' sumare...
Kelnero! Vinon!
Truoj en la ŝtrumpoj?

Diablo prenu truojn en la ŝtrumpoj!
Diablo prenu truojn en la ŝtrumpoj!
Mi havas sunon, ombron!
— tutan mondon!
Se mi nur havus... etan ruĝvestitan
... blond-karulinon...

Trad: LKH

★

Gunnar Reiss-Andersen:

AL LA KORJOJ

Ne ŝin forgesu,
kiun ne vidis. —
Ŝi eble vidos
vin post la morto.

Ne ŝin forgesu,
kiu atendis
por vin renkonti
la tutan vivon.

Ne ŝin forgesu,
kiu sopiras.
Ne ŝin forgesu,
ĉar ŝin vi amas.

Ne ŝin forgesu,
Nur ŝi ja estas
kion vi amas
en la amata.

Trad: LKH

VINCAS PIETARIS :

Sorto de malnoblulo *

El la litova tradukis Kl. Naudzius

Sur terposedaĵo de vilaĝano Akmenukas, ĉe herbejo, staris malnova linsekigejeto. Sur ĝia malnova muskiginta tegmento tie kaj ĉi tie jam ekkreskis herbo. Truoj en la tegment-supro, flikitaj per pajlo kaj linotigaĵo kaj surpremitaj per putriĝintaj ligno-stangetoj, kvazaŭ defendas ankoraŭ de pluvo, tamen en kelkaj lokoj jam gutas sur la plafonaĉon. Malnovaj muroj, kelkloke jam fariĝintaj putraĵo, kliniĝis kaj malrektiĝis. La lumo avaras eniĝi en la linsekigejeto tra malgrandaj fenestroj, kaj tiu sama neniigis ŝutiĝinte sur la pro fumo nigriĝintaj muroj, sur la argilan terplankon. Estas mallume en la linsekigejeto, mallume en antaŭĉambro, farita el dikaj tabuloj, kvankam en ĝi estas multe da fendoj, tra kiuj eniras la lumo, kvankam tiuj ĉi fendoj estas grandaj, — tamen ja ili ne estas fenestroj.

En la linsekigejo, maldekstre, ĉe la muro kaŭrigite staras argila fornego, ĉe kies fino videblas lito, antaŭ kiu

pendas lulilo — «bieno de la kriemuloj». Du benkoj ĉemure sur palisetoj, du seĝoj faritaj el tabuloj, argila kruĉeto, du pladoj, du lignokuleroj kaj malgranda pota — jen estas la tuta riĉaĵo de la loĝanto de l'domaĉo. Por ne ofendi la veron, endus aldoni, ke la pajlo sur la lito estis surkovrita kvazaŭ per sako, kvazaŭ per litotuko, kaj sur la lulilo pendis kelkaj ĉifonoj.

En la linsekigejo loĝis libera dungito de Akmenukas, Johano Bevuogis kun sia edzino Elizabeto kaj trijaraĝa ido. En la linsekigejo estas neniŭ. Tra malfermitaj pordoj de la linsekigejo kaj de la antaŭĉambro penetris internen varma someraero. Varmaj sunradioj gaje ŝprucfalas tra la fenestroj sur la argilplankon, sur la muron. Estas silente kaj kviete. De ĉirkaŭaj herbejoj kaj kampoj venas odoro de herboj kaj grenoj. La preteriranta vojeto, forbalaita de vento, ne polvas. Estas silente kaj kviete. Nur ie malproksime, sur la kampoj, ekkrias paŝtistoj, nur de tempo al

tempo pli laŭte ekvoĉas brutaro, kaj kiam ili silentas, oni aŭdas nur al-aŭdetojn trili.

Tiel estas ĉiun tagon.

La aŭgusto iris alfinen. En vesperkrepuska horo la Bevuogis-paro iris hejmen. Johano kunportis falĉilon, kaj Elze (Elizabeto) — dormantan infanon sur la brakoj. Ili ambaŭ iris senparole, lacaj.

— Kuŝigu la infanon en la lulilon kaj iru por dormi, se vi deziras; mi ankoraŭ ekfumos la pipon, — veninte al la linsekigejo ekparolis la edzo.

La ino senresponde eniris internen kaj, kuŝiginte la homidon en la lulilon, eliris eksteren al la edzo, riproĉante:

— Ree mi trovas la pordon de vi restigitan malfermita.

— Ĉu io malbona okazis?

— Ne, tamen ja ne estas inda kuintimo.

— Kion do ĉe ni trovus, se eĉ trafus iu ŝtelemulo? Kelkajn ĉifonojn.

— Estas la vero, Joĉjo! Dum vi malsanis, ni tute mizeriĝis. Ĉu vi ne parolis kun la mastro, kiel estos dumvintre?

— Kiel estos? Estos aĉe. Li ne pelos nin for el la linsekigejo, tamen ankaŭ ne nutrigos senkompece.

La ambaŭ eksilentis, pensante pri sia farto. Por laborulo alia eblo estas somere, kiam ĉie troviĝas laboro kaj ne estas bezona hejtmaterialo, sed tute male estas en vintro. Mankas laboro, tamen oni necesas sin nutri, ankaŭ hejtlognon bezonas.

— Vintroj estis kaj estos. Dio protektis kaj protektos, pensis al si Johano kaj ekparolis al la edzino:

— Ne ankoraŭ endas, Elĉjo, tro zorgi. Ĝis kiam oni posedas manojn, oni povas kredi vivrimedojn. Tamen jam nun estas la tempo por klopodi pri iu profito porvintra.

— Estas konataj la ebloj en vilaĝo: por virinoj — la ŝpinado, por viroj — la draŝado, ĝis kiam tio ne finiĝas...

Eble en urbo vi povus trovi ian laboron.

— Bone vi konsilas! rediris Johano, — mi iros por sondi. Vi kunkolektos iom da okazo — por ke la irado ne estu tute senutila; ŝajnas, ke nune tiuj ĉi folioj ne estas multpostulata legomaĵo, tamen eble almenaŭ iom mi profitos.

Jam komenciĝis varma kaj hela somernokto. Eksilentis la kampoj kaj la tuta ĉirkaŭaĵo. Johano finis fumi la pipon kaj ekserĉis per kio li gratpurigu ĝin kaj metu en ties ĉiaman ejon — en poŝon de l' veŝto. Tiutempe el malproksime, kvazaŭ el de la vojo, aŭdiĝis voĉado kaj bruado. Post kelka tempo ĝi fariĝis pli laŭte aŭdebla.

— Kio nun povus esti ĉi tie? demantis Bevuogis-edzino.

— Iu malsobro revenas hejmen, plej kredeble — Jurgela. Kiu do alia kriiĉus en nokto.

— Nu jam! nekredeme rediris Elze, — ja ankaŭ ĉe li la sekalfalĉado tempas.

— Kion al li signifas la sekalfalĉado! Li estas homo jam ne de nun riĉa, ankaŭ nune li ekzistas ne dank' al la terkulturado, tamen dank' al malnova havaĵo. La tero, Elĉjo, nun ne onin sekuras — nek la vilaĝanonterposedanton, nek la laborulon.

proksime de la linsekigejo, el trans proksime de la linsekigejo, el trans plata monteto, aperis parĉevala veturilo kun en ĝi sidanta homo. La ĉevaloj, ne gardante la vojon, sin fluglasis malsupren de l' altaĵo kaj komencis ege skuadi la veturilon kaj, videble, dolorigis la homon, ĉar li komencis insulti kaj, kaptinte la kondukilrimenojn, ekkriis al la ĉevaloj:

— Ho, pŝekrep, stoi, stoi. (Ilo, hundosango, haltu, haltu.) **

** Pole-rusa ĵargono estis la unua distingilo de litovoj denaciigintuloj; la aŭtoro donas kelkajn ties specimenojn (kursive).

* Por ĝuste kompreni la temojn, necesas kelkaj antaŭklarigoj. — Je la fino de la 18. jc. la unuigintan Litove-Polan ŝtaton disdividis inter si la najbaroj. Litovojn — kun ties per servuto sklavigita vilaĝanaro kaj poliĝinta nobelaro — ekposedis Rusujo. En 1831 kaj 1863 okazis porliberiĝaj ribeloj, instigitaj de poloj, en kiuj la simpla popolo litova partoprenis tute nekonksiderinde (la servutulojn ne interesis kiu el la du rivalantoj restos tenanta la kondukilojn de ilia juĝo). Tamen plej doloraj punoj pro la ribelado trafis la litovojn: krom ĉio alia, la cara registaro malpermesis libropresadon en la litova lingvo (de 1864 ĝis 1904 j.). Tiam litovoj komencis eldonadi litovajn presaĵojn eksterlande kaj, malgraŭ severa persekutado kaj punoj, kaŝe transportigadis Litovujon. Endas aldoni, ke la polaj libroj kaj gazetoj en Litovujo estis permesitaj kaj ankaŭ helpis pligrandigi la nacian degenerigon (komenciĝintan kun la enkonduko de la kristanismo kaj pli malfrue igatan ankoraŭ de la denaciiga politiko de l' rusa caro) de litovoj. La novelo (ĝi aperis en 1899, ankaŭ en malpermesata presaĵo), en ĉi-traduko iom mallongigita, prezentas bildon el la tiama vivo en litova vilaĝo, pentritan per tre naturaj koloroj kaj aludantan al vera okazintaĵo.

— Nu, ĉu mi ne diris? ekflustris Johano Bevuogis al la edzino.

— Jes, certe li estas Jurgela, respondis ŝi, rigardante kiel tiu mal-sobra manipulas la ĉevalojn per la kondukiloj kaj mem estas ĵetata de unu veturilflanko al la alia.

— *Ĉto-to? Co to diabli? Jak dam!* (Kio-tio? Kio do diabloj? Jen mi ekbatos!)

La ĉevaloj, vipe trafitaj fojon kaj alian kaj malordeme manipolataj, ekgalopis ekstervoje tra kavoj kaj herbejtuberoj. La veturilo renvers-iĝis.

— Ĉu vi vidas kio okazas nun ĉi tie? parolis Bevuogis, leviĝante de l' sojlo, kaj sin ĵetis por helpi Jurgela'on. Do ĉi tiu, forgesinte ĉiujn fremdajn lingvojn, en klara la litova vokis pri helpo:

— Helpu! Helpu, kiu kredas en Dio!

La ĉevaloj, implikiĝintaj en la jungilaro, piedbatis kaj zigzagis tra malglata herbejo, ŝancelante la veturilon kaj skuante Jurgela'on. Bevuogis ek-kaptis je la timono, sed la ĉevaloj renversis lin kaj forte trafis ĉe la flankajo. Tamen la vivo, malgraŭ la doloro, leviĝinte ree kaptis la ĉevalojn, nun jam je la birdoj, kaj iomete haltigis ilin.

— Elze! li ekkriis, — kuru ĉi tien: mi sole ne povas; kuru, rapidu!

La ĉevaloj plumalkvietiĝis kaj hufbatis. Jurgela, kuŝante sub la veturilo, ĝemis kaj vokis pri helpo. Bevuogis, dezirante plej baldaŭ liberigi la homon, en unu manon ekkaptis la kondukilrimenojn kaj per la alia, kiom li povis, penis eklevi la veturilon de sur Jurgela.

— Obeigu la ĉevalojn! obeigu la ĉevalojn! kurante ekkriis Bevuogis-edzino. — Ili surpaŝos sur la kapon de Jurgela. Obeigu la ĉevalojn!

(*Daŭr.*)

Norvega Kroniko

La kluboj ne diligente kaj ne regule raportas pri siaj kunvenoj — kun kelkaj malmultaj esceptoj: ĉiam la samaj kluboj reaperas en nia norvega kroniko.

Cifoje raportas *Klubo Esperantista en Oslo* pri 2 someraj klubkunvenoj:

Merkredon 12. junio okazis la tradicia junia kunveno en Nesodden en la somera hejmo de familio Støp-Bowitz.

Kiel kutime, kelkaj klubanoj kaptis la okazon bani sin en la fjordo. — Sur la granda verando kaj ekster la domo ni ĝuis sunon, babiladon, la kunportitajn manĝaĵojn, kaj kafon preparitan en la kuirejeto de Eva Støp-Bowitz.

C. Støp-Bowitz raportis pri la landkunveno de Norvega Esperantista Ligo okazinta en Stavanger dum la Pentekosto. Al Nanna Fridrichsen, kiu dum la landkunveno fariĝis kavaliro de la ordeno Pro Merito, li transdonis la ordenan insignon, kaj ĉiuj ĉeestantoj forte aplaudadis.

La kunveno finiĝis per ludoj kaj dancado laŭ akordiona muziko de C. Støp-Bowitz, kaj la ŝipveturo reen al la urbo okazis en same bela vetero.

Dimanĉe 30/6 Else Bugge-Paulsen akceptis ekskurson de la klubo en sia bela domo ĉe lago Tyrifjorden.

Bedaŭrinde la matena ne tro bela vetero timigis multajn klubanojn, sed ĉiuj klubanoj kiuj kuraĝe venis, pasigis tre agrablan tagon ĝuante belan someran veteron preskaŭ la tutan tempon.

En la klubo en Oslo okazis en septembro la unua aŭtuna klubkunveno. La kluba prezidantino Kirsten Ek kaj la vic-prezidanto de N.E.L.

Ludvig Anjer rakontis pri siaj impresoj de la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio.

Nia klubanino Aslaug Refsing estis bonŝanca gajninto de unu el la stipendioj lotumitaj de NEL inter tiuj lernintoj de Esperanto kiuj en la lerneja jaro 1962—1963 finstudis korespondan kurson aŭ trapasis Esperantan ekzamenon. En la septembra kunveno en la Deichmanske-filio ŝi donis al ĉeestantaj klubanoj entuziasmigan bildon pri la interesa semajno en la Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingør, kiujn ŝi partoprenis per la stipendio. — Kiel multaj aliaj norvegaj partoprenintoj de la Helsingør-aranĝo ŝi esperas reveni. Por tiuj klubanoj kiuj ĉeestis la aranĝon en 1962, estis interese aŭdi ke la Esperanta standardo por kiu ni tiam kolektis monon inter la partoprenantoj, nun estis hisita sur la flagstango de la Internacia Altlernejo.

En la sama klubkunveno la ĉeestantaj klubanoj havis la bonŝancon konatigi kun tre ĉarma gasto — la juna japana studento Nobuyuki Shoji, kiu estas prezidanto de la 50-membra studenta grupo en lia universitato. — La celo de lia mondrondovojaĝo estas konatigi kun gejunuloj kaj instige inviti ĉiujn esperantistojn veni al nia Universala Kongreso en Tokio 1965. Per sia afabla konduto kaj perfekta Esperanto li estas bonega reprezentanto de Japanio kaj de Esperanto, kiu certe akiras multajn novajn amikojn. — Nobuyuki Shoji estas homo kiu kapablas kombini la modernan okcident-influitan vivmanieron kaj la tradici-plenan japanan stilon. Tial estis al li tute nature porti japanan kostumon kaj kunporti la specialan skribilaron kiun oni uzas skribante la japanajn literojn. Lia prelego donis al ni impreson pri progresema orienta ŝtato, pri la moderna ĉefurbo Tokio

kaj pri diversaj naciaj kutimoj. — Post sia prelego li humorplene respondis demandojn, kiuj parte tuŝis aktualajn praktikajn detalojn por eventualaj vizitontoj al Japanio.

*

La Urso en Sarpsborg raportas pri du kunvenoj. En unu el tiuj kunvenoj la prezidanto, J. H. Rosbach, prezentis tute novan lumbildprogramon, originalan laŭ formo kaj laŭ enhavo, sub la titolo «Kabareto». — En la dua, kiu okazis en la tago mem de UNO, li paroladis pri Esperanto, UNO kaj UNESCO, kaj la ĉeestantoj sendis salutleteron al UNO.

*

Per tio ni forlasas la orientan kaj transiras al la okcidenta parto de nia lando.

La Esperantoklubo de Bergen informas, ke ĝi kunvenis la 25-an de septembro. La vicprezidanto Agnes Hennemann bonvensalutis kaj malfermis la kunvenon. — Kjell Offerdal prelegis pri «Kaverna esplorado en Pireneoj». Ĉisomere li vojaĝis al Hispanujo kaj tie li sole esplorvagadis en la Pireneaj montoj, kaj vizitis multajn kavernojn. Li rakontis pri la kreado de la kavernoj, kaj per desegnoj kaj afiŝoj ilustre montris diversspecajn kavernojn. Li parolis pri multaj danĝeroj, kaj fine donis bonajn konsilojn al ĉiuj, kiuj intencas iam fari kavernesploradon.

Post kafaŭzo ni pritraktis internajn klubaferojn.

Kunveno okazis la 9an de oktobro sub gvido de la vicprez. La kunveno estis aranĝita kiel laborvespero, kaj post ĉiam ni kantis «Esperanton lernas ni». Doris Birkelund prezentis la ekzercan taskon. El unu vorto la ĉeestantoj devis formi frazojn, kaj poste laŭtlegi la rezultojn. Oni trovis multajn solvojn, seriozajn — kaj ankaŭ amuzajn frazojn. Per tio la parto-

prenantoj lernis novajn vortojn.

Majken Wagle Jørgensen rakontis pri la kongresvojaĝo, la restado kaj travivaĵoj en la kongresurbo Sofio.

*

En Haugesund «*Mara Vento*» okazigis sian unuan postferian kunvenon la 12an de septembro. Malfermis ĝin la prez. esprimante la esperon ke la nova laborsezono estu progresita kaj prospera. Li transdonis salutojn de esperantistoj renkontitaj dum la UK en Sofio.

Programulo estis Johs. Sortland, kiu vive kaj interese rakontis pri sia unua kongresvojaĝo, kaj en ĉarma maniero priskribis siajn impresojn el la restado en la kongresurbo. La rakontadon akompanis prezento de plaĉaj kolor-lumbildoj faritaj dum la vojaĝo.

Nova kunveno okazis 3/10. Ni kiel kutime komencis kantante, kaj sekvis klubaj pritraktoj. Priparolata estis la studlaboro kaj estis decidate refunkciigi antaŭan rondon kaj se eble funkciigi rondon de novuloj.

La prezidanto kiu kune kun du aliaj klubanoj partoprenis la Universalan Kongreson en Sofio, raportis pri la impona manifestacio rakontante pri kongresaj travivaĵoj kaj spertoj - kaj pri sia renkontiĝo kun gesanoj el kvin kontinentoj.

*

Fine ankaŭ *La Granda Ideo*, la klubo en Skudeneshavn, raportas, ke ĝi post iom da penado kaj je kunlaboro kun la lernejestraro, sukcesis starigi kurson en Esperanto. La kurso estas aranĝita kaj staras sub «Fritidsundervisningen» en Skudeneshavn, kaj la instruadon gvidas la sekretario de la klubo.

La afero sukcesis, dank' al la estraro de la Libertempa Instruado en la urbo — kaj dank' al la komunuma prezidanto en Skudenes, kiu sin anoncis kiel lernanto por plenigi la liston —. Kaj — ankaŭ dank' al la urbprezidanto en Skudeneshavn, kiu estas membro de la klubo kaj forte rekomendas la laboron por Esperanto. La kurso komenciĝis la 17an de sept. kaj daŭras ĝis la 3-a de decembro (marde de la 18 horo ĉiun semajnon). La kurso funkcias bone, kaj eble ni povas diri ke ĝi estas ĉenero en la nova «*Lerneja Kampanjo*».

La estraro de nia klubo, elektita de la lasta jarkunveno, estas:

Prezidanto: Chris Hansson
 Vicprezidanto: Bjørg Torkelsen
 Sekretario: Didrik Mjølhus
 Kasisto: John Blixhavn
 Estrarano: Ragnh. Høynes
 Anstataŭanto: Martin Meltvik.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
 Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
 Telefon: 42 47 79
 Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
 Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
 Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
 Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østernsøvn. 118 a,
 Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
 Johan Hammond Rosbach,
 C. E. Holters vei 1 C, Sarsborg: - Uzu tiun
 adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.
 Telefono: 54 727